
KONGRESA KURIERO

# DRAKO DE BRNO

⑥

2025-08-01

de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno 26 julio – 2 aŭgusto 2025



## Vendredaj komitataj kunsido kaj forumo Programŝanĝo

Anstataŭ la programo videbla en la Kongresa Libro aperu jena ĝisdatigita programo:

Vendredon, la 1-an de aŭgusto, 9h00-9h30 **Informado** (salono Hodler)
Vendredon sekvos la 3-a kaj lasta **Komitata kunsido**:
- matene 9h30-12h30 en Hodler,
- kaj posttagmeze 12h45-14h15 en Corsetti,

Aleks Kadar, KN 39

## La movado "Eŭropo-Demokratio-Esperanto"

invitas vin malkovri ĝiajn agadojn: atentigi pri la lingva problemo de Eŭropa Unio kaj proponi Esperanton kiel help-lingvon por ĝin solvi. EDE, vendredon je la 12-a en Urbanová. Venu multnombraj!

Eliz BARBAY, KN 1084

## Kiel daŭrigi la bonan etoson de la UK?

**Ĉiuj el ni ĝuas la varman etoson de ĉi tiu Universala Kongreso en Brno, sed post la fino de la kongreso, multaj spertos postkongresan deprimon. Kiel oni povas daŭrigi tiun bonan Esperantan etoson?**

La **Mediteranea Esperanto-Semajno** estas semajno de Esperantaj kursoj, prelegoj, vesperaranĝoj, ekskursoj ktp. en agrabla etoso. Ĝi okazos en Les Issambres, ĉarma trankvila marborda feriejo, ĉe la Lazura marbordo, inter Marsejlo kaj Nico en **suda Francio**. La Mediteranea Esperanto-Semajno okazos **de la 14-a ĝis la 21-a de marto 2026**, ĝustatempe por ĝui la printempon apud la mediteranea marbordo, kiam ankoraŭ frostas en norda Eŭropo. Elstaraj instruantoj atendos vin: Katalin Kovats, Pawel Fischer-Kotowski kaj Maurizio Giacometto, kaj ankaŭ sindonemaj organizantoj. La staĝo okazos en komforta hotelo apud la marbordo, kie oni servas bonan manĝaĵon. Les Issambres ankaŭ proponas marbordon kun dogana migrovojo inter fajna sabla strando kaj sovaĝaj golfoj, naŭtikajn agadojn, kaj multajn mirindajn vidindaĵojn en la ĉirkaŭaĵo.

Pli da informoj kaj aliĝilo troveblas ĉe https://provenco.esperanto-france.org

Thierry Spanjaard
Estrarano de Esperanto-Provence

## Lastmomentaj aliĝintoj

598 **S-ino Elena Hiard,** hiarde@icloud.com, Britio
1125 **S-ro Miroslaw Dziedzic**, Pollando
1126 **S-ro Jan Navrátil**, Ĉeĥio
1127 **S-ro Ondřej Cílek**, Ĉeĥio
1128 **S-ro Adam Janusz Wilkus**, Pollando
1129 **S-ino Markéta Wilkus-Tříšková**, Pollando
1130 **S-ro Lajos Pallagi**, Hungario
1131 **S-ro Philipp Prettenthaler**, Aŭstrio

# Ekskurso al Slavkov Batalo de tri imperiestroj

Marde la 19-an de julio okazis tuttaga ekskurso al batalkampo de tri imperiestroj - rusa Aleksandro, aŭstria-hungaria Francisko la 1-a kaj franca Napoleono. La ekskurson partoprenis 30 kongresanoj kaj tri gvidantoj: Radmila Švejcarová, Marek Blahuš kaj mi, Josef Vojáček. Dum la ekskurso ni vizitis laŭ la programo tri lokojn: la monteton Žuráň (legu Ĵuranj), de kie Napoleono gvidis la batalon; Monumenton de paco sur Pracký kopec (Praca monteto), nomitan laŭ la vilaĝo Prace situanta sub ĝi; kaj kastelon en Slavkov. La gvidantoj havis bone disdividitajn taskojn kaj laboron: Radmila estis la ĉefa gvidanto kaj post la forveturo konatigis la ekskursantojn kun la biografio de Napoleono kaj kun la politika situacio, kiu gvidis al la batalo, kaj kun la postsekvoj. Poste ĝis Žuráň kaj sur Žuráň Marek kaj Josef priparolis la batalon mem. Ĉe la Monumento ni unue ŝtupargrimpis sur du platformojn, de kie estis bona ĉirkaŭrigardo kaj precipe bona vido de la Monumento. Kion tie loka ĉiĉerono diris pri la batalo kaj la Monumento, interpretis Marek. Poste ni trarigardis parton de ekspozicio kaj nur de ekstere la Monumenton, ĉar internen en la kapelon ne eblis veni pro riparoj. Same estis riparata kaj nealirebla parto de la ekspozicio. Poste Marek pro organizaj devoj ne plu veturis kun ni. En Slavkov ni unue fortiĝis per bongusta tagmanĝo en la kastela restoracio kaj sekvis trarigardo de kastelo. La komentarion de loka ĉiĉerono interpretis Josef. Poste sekvis paŭzo por trarigardo de la kastela parko aŭ/kaj ripozi. Post komuna fotado nia aŭtobuso veturigis la lacigitajn turistojn reen al Brno.

KN192 Josef Vojáček

**Vidu la kongresajn fotojn** de la aliaj kongresanoj, **alŝutu la viajn** al la komuna Google-albumo! Skanu jenan QR-kodon:

# Donackampanjo KuriPorKONGO

konsistas el serio de donackuradoj. En donackurado estas kuranto kaj donacanto. Antaŭ la evento la donacanto deklaras, ke por ĉiu rondo, kiun finkuras la kuranto en 30 minutoj, li donacas iun monsumon, ekzemple 2 €. Poste la kuranto kuras kaj la donacanto ricevas la informon, kiom da rondoj ria kuranto finkuris kaj donacas laŭ tiu nombro al la projektoj en Kongolando. Se ekzemple kuranto finas 9 rondojn, la sumo estus: 2 × 9 = 18 €. Tiel okazis jam du eventoj en kiuj mono estis kolektita por kongolandanoj, unu dum KEKSO en Germanio kaj unu dum la Roskilde-Festivalo en Danio. Se vi scivolemas, estas raporto pri tio trovebla en la retejo: https://kuriporkongo.wordpress.com/

Estas korvarmige sperti la solidarecon, kiun ekmontris la homoj-sponsoroj kaj la kuranto surloke dum la lastaj eventoj. Ne ĉiu povas donaci multon, sed eĉ per 30 $ oni povas aĉeti surloke matracon aŭ pagi instrukotizojn de infano en la kamparo dum unu jaro.

Vi kiel sponsoro povas nun aliĝi por subteni la kurantojn de la Internacia Junulara Kongreso en Indonezio kaj de FESTO en Francio, se vi iam pripensis helpi al kongolandaj esperantistoj. Se vi deziras plifortigi la internacian solidarecon inter Esperantistoj, aŭ se vi ne scias kion fari kun la monstoko kiun vi trovis sub via lito, nun estas la momento por ke vi iĝu Sponsoro!
https://mallonge.net/kuriporkongo

Aŭ skanu la ĉi-malsupran QR-kodon.

Frédéric Düe

# Novaj programeroj por vendredo (2025-08-01)

***Aŭtora duonhoro*: Maksik kaj liaj geamikoj**

Prezentiĝos tute nova infanlibro de la fama slovaka verkistino Danuša Dragulová-Faktorová.
La libron prezentos la tuta eldon-teamo: Tomáš Halža (traduko), Petro Baláž (eldono), Magdaléna (Fejfi) Feifičová, Miroslav Malovec (provlegado).
Vendredo, 10h00 en la salono „Ginz“ (X02, apud Libroservo)

***Aŭtora duonhoro:* Esperanto kaj lingvolernado en la epoko de artefarita intelekto kaj virtuala realo**

Nova eldonaĵo de UEA kaj E@I: la prelegkolekto de KAEST – la evento "Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" en 2024. (Prezentiĝos ankaŭ la prelegkolektoj de la pasintaj KAEST-oj.)
Prezentos: Petro Baláž
Vendredo, 11h00 en la salono „Ginz“ (X02, apud Libroservo)

# Skribu ion pri Renato

Ĉe la informejo troviĝas verda kajero, sur kiu ĉiuj rajtas skribi ion pri Renato Corsetti.
KN 500

# Riĉa scienca programo

Post la relative malpligranda programo en Aruŝo (7 prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj 4 prelegoj de la Scienca Kafejo), la ĉi-jara estis denove abunda kaj tre diversa. Okazis entute 20 sciencaj prelegoj, 9 kadre de IKU (el ili 2 okazos vendrede), kun 3 daŭrigaj prelegoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kaj 8 prelegoj de la Scienca Kafejo, en du blokoj de po 4 prelegoj.
Kunordigis la sciencan programon la IKU-rektoro Věra Barandovská-Frank kaj la eliranta IKU-sekretario kaj estrarano pri scienca agado Amri Wandel. La prelegoj altiris grandajn nombrojn de spektantoj; ekzemple la IKU-AIS-kursojn de Bebenina, Koutny kaj Wandel vizitis po 112, 100 kaj 145 personoj. La prelegojn de la Scienca Kafejo partoprenis 60–100 personoj.




La temoj ege variis, eble eĉ pli ol kutime: Matematiko, Lingvistiko, Spacteknologio, tri prelegoj temis pri Historio, Arkitekturo, Literaturo, Medicino, Lingvopolitiko, Kemio, Arkivistiko, Fiziko, Daŭripovo, Sociologio, Planto-scienco kaj Biologio.



La abunda scienca programo spronis rekorde grandan IKU-libron de 330 paĝoj, kiu enhavas ankaŭ kvar tekstojn de la lasta Scienca Universitata Sesio okazinta komence de julio dum la Baltiaj E-tagoj en Kaŭno. Kiel ĉiam, ĝi havas resumojn en la

angla, franca kaj, kiel loka lingvo, la ĉeĥa. Aprezis tion la reprezentanto de la urbestrino, kiu ricevis ekzempleron de la IKU-libro dum la urba akcepto.

En du el la tri IKU-AIS-kursoj okazis ekzamenoj. Pri spacteknologio (Wandel) ezameniĝis 28 personoj, pri nombroinformo (Bebenina) – du. La atestojn oni disdonos vendrede dum la Scienca Forumo.

Plu okazos dum la Scienca Forumo la disdono de la Premio Pirlot por la plej bonaj sciencaj libroj, kaj la nova Premio Charles Power, por la plej bonaj sciencaj prelegoj.

Ĵaŭde posttagmeze okazis la Faka Forumo, kiun kunordigis la estrarano pri Faka kaj Scienca Agado en la malnova estraro, Amri Wandel. Pli ol 20 Fakaj Asocioj kaj sciencaj grupoj prezentis sin.

**Ekskurso en la Universon: Stelobservado**



Nekutima elemento de la scienca programo de la burna UK estis ekskurso E8, okazinta merkrede vespere, al la moderna planetario de Burno. La 140 partoprenantoj ĝuis specialan 40-minutan 3D-programon “La Universo per ĉiuj sensoj” kun E-tradukado zorge preparita de la LKK, prelegon pri la historio de astronomomio de Amri Wandel, kiu sekve gvidis virtualan viziton de la nokta ĉielo helpe de la plej novaj rimedoj de la planetario, ekde la planedoj de nia sunsistemo, plu al la reale videblaj konstelacioj en la somera ĉielo, finante per spektakla forvojaĝo el nia galaksio en la najbaran galaksion Andromedo, kaj esploran sperton en la observatoria kelo pri la plej foraj objektoj de la universo.

# Pola RetRadio raportas pri la 110-a UK en Brno

Ne ĉiuj esperantistoj povas partopreni la 110-an UK-on en Brno. Por ili tradicie ankaŭ dum ĉi tiu kongreso laboras Pola RetRadio kaj ĝia nunjara raportisto, red. Barbara Pietrzak.

Ĉe la adreso www.pola-retradio.org ekde la 26-a ĝis la 30-a de julio 2025 aperis jam kvin raportoj kun la prikongresaj sonscenoj. Pliaj sekvos kaj krome kolektitaj interparoloj kaj intervjuoj aŭdiĝos en la elsendoj en la postkongresa periodo.

Aŭskultu mem: kiel rememoron pri la kongresa semajno, aŭ aŭskultigu aliajn. Nepre komentu, nepre subtenu ĉe nia UEA-konto “vars-t”, kontribuu per viaj Esperanto-movadaj informoj por variigi kaj ĝisdatigi niajn Esperanto-elsendojn.

Red. Barbara Pietrzak, KN 722

# D9 Arbarista panteono



# Niaj infanoj desegnis




Redaktoro: Miroslav Malovec
drako@esperanto.cz
Provlegis: Marek Blahuš, Rob Moerbeek